Novjorka Prismo

Numero 110 Januaro 2002

*La Esperanto-Societo de Novjorko*
*kore invitas vin al sia januara kunveno . . .*

DATO: Vendredon, la 18-an de januaro 2002, 6:30-9:00 ptm

LOKO: United Federation of Teachers
260 Park Avenue South (20th/21st Streets), NYC
2nd floor (check schedule in lobby for room number)

PROGRAMO: 6:30 – Babilado kaj refreŝigaĵoj.

7:00 – Tomaso Eccardt prezentos prelegeton pri **La Nanolandoj (malgrandaj nacioj) de Eŭropo.**

– Diskuto pri kiel plibonigi nian klubon kaj niajn kunvenojn. ★

## Nia Zamenhofa Festo, la 21-an de decembro 2001

Vendredon, la 21-an de decembro 2001, nia klubo okazigis sian ĉiu-jaran



Zamenhofan Feston. Multaj personoj kunportis manĝaĵojn kaj trinkaĵojn, kiujn oni aranĝis en bufedon. Ĉeestis proksime 20





personoj, inter ili kelkaj gastoj kaj neofte aperantaj membroj. Kelkaj personoj faris mallongajn prelegojn pri la vivo de Zamenhof, la kreinto de Esperanto.

La klubo okazigis sian elektadon por la venontjara estraro. La





sola nova estrarano estos Arturo BONETTI, kiu estos nia Program-





direktoro. La aliaj restas la samaj.

Je la fino de la festo, post la elektado, la ĉeestantoj kantis kelkajn kantojn en Esperanto. ★

*Protokolis:*
*Stuart GREEN*



DUES ARE DUE for 2002! Ĉu vi jam pagis vian kotizon?

## Sony Plaza iĝas IBM Konstruaĵo!

Fakte, la konstruaĵoj mem restas same. Sed pro la granda bruo kion faras la varmigado de la Sony konstruaĵo, ni decidis okazigi la estontajn neformalajn renkontiĝojn en la eks-IBM konstruaĵo. Tiel ni aŭdos pli bone unu la alian. Ni renkontiĝos en la publika spaco kun tabloj, kiu tre similas al tiu de Sony Plaza. Kaj fakte ĝi troviĝas en la sama loko, la najbara konstruaĵo, jus trans la 56-a strato. La nova, oficiala nomo de la eks-IBM konstruaĵo estas 590 Madison Avenue Plaza.

Se ial ni ne povas renkontiĝi en la eks-IBM konstruaĵo, ni renkontiĝos en la Sony konstruaĵo kiel antaŭe. Flanke, se vi iam ajn iras al unu el niaj neformalaj renkontiĝoj kaj ne trovas la grupon en unu el tiuj du konstruaĵoj, bonvolu serĉi nin en la alia. ★

– *Thomas ECCARDT*

*Feliĉan Novjaron!*

**2002**



## UFT translokiĝos


Laŭ *The New York Times* de la 11-a de januaro, UFT translokiĝos al du novaj konstruaĵoj en suda Manhattan. La novjorka sindikato de instruistoj vendos sian sidejon ĉe 260 Park Ave. South, kaj aĉetos 50 kaj 52 Broadway. Espereble, kiam ili finfine translokiĝos en frua 2003, ili permesos nin daŭre uzi ĉambron por niaj klubkunvenoj. Dankon al Leonardo Dzelzitis, kiu informis nin pri la novaĵo. ★

– *Thomas ECCARDT*

## Laste vizitis

Tranoktis ĉe ni, la 3-an de januaro, Bojan STANOJEVIC, el Belgrado, Jugoslavio. Bojan estas 32-jaraĝa inĝeniero, kiu esperantistiĝis antaŭ 9 jaroj, estas gastiganto de Pasporta Servo, kaj ŝatas ofte partopreni en Esperantaj renkontiĝoj en Eŭropo. Li vizitis Novjorkon survoje hejmen, post monato en Atlanta, kie li vizitis sian fraton kaj lian edzinon. Bojan intencis pasigi pli da tempo en Novjorko, sed pro la neĝoŝturmo en la sudaj ŝtatoj, li bedaŭrinde devis tranokti en la flughaveno de Atlanta. Tamen, li sufiĉe multe turismis en nia urbo per aŭtobusoj, kaj li varme salutas la anojn de la Esperanto-Societo de Novjorko. ★

– *Jim MEDRANO*



*Bojan Stanojevic*

## Societa Kalendaro

Venu al niaj venontaj renkontiĝoj! Metu tiujn datojn en vian kalendaron.

**Januaro 2002** — **18**

**ESNY KUNVENO**
Tom Eccardt: Nanolandoj
*Vendredon, 6:30 ptm ĉe UFT*

**Februaro** — **3**

**Tagmanĝo**
*Dimanĉon, 1:00 ptm ĉe (IBM)*
(Limdato por kontribuaĵoj por *Prismo* 111)

**15**

**ESNY KUNVENO**
*Vendredon, 6:30 ptm ĉe UFT*

**United Federation of Teachers** (UFT)
260 Park Avenue South, NYC
(20th/21st Streets), second floor
(check schedule in lobby for room number)

**"IBM" Building Atrium** (antaŭa nomo)
590 Madison Avenue (56th Street) NYC
Street level, in the Atrium

## Apartamento havebla

Semra Çelik, nia samklubanino volas vojaĝi al sia hejmlando, Turkio, kaj bezonas sublui sian 1-dormo-ĉambran apartamenton en Astoria. La luado daŭros 6 monatojn kaj komenciĝos en marto. Se vi interesiĝas, bonvolu kontakti ŝin ĉe 718-956-0563. ★

– *Thomas ECCARDT*

## Pagintaj anoj de la Esperanto-Societo de Novjorko 2001

| | | | |
|---|---|---|---|
| Arlen Baden | Adolph Fuerst | Michael R. Lewy | Lillian Rachele |
| Randell Barclay | Margot H. Gerson | Pamela Lieber | Douglas M. Rose |
| Lynn C. Bartlett | Irene Ginsberg | Jon Liechty | Mark Ryszewski |
| George Baker | Naomi Goda | Jonathan Lomotey | Maki Sano |
| Ulrich Becker | Stuart M. Green | Cécile Low | Isolde Schehr |
| Marta L. Bergonzoli | Rochelle F. Grossman | Steve M. Mann | Ŝijimin |
| Nijl Blonstein | Takaki Julian Hashimoto | Eugene Markov | Janos A. Ŝipos |
| Arthur Bonetti | Rosa Resnick Helfgot | Rebecca Medrano | Sofiya Soskina |
| David R. Brown | Hortense Howell-Barber | Emily Medrano | Witold Symonowicz |
| Paul J. Burke | Pierre Jelenc | Jim Medrano | Gloria C. Taylor |
| Eugene Calvert | Renata Kaczmarska | Nancee Medrano | Arnold Victor |
| Emine S. Çelik | Alexander Karkovsky | Laura Miller | Shep Wahnon |
| Richard P. Connell | Susan D. Kohn | Carlos E. Ortiz | Cristina de Moura Walsh |
| Richard D. Dinnen | Ernest E. Kovary | Dan Perlman | Maurice J. Wittenberg |
| Leonard Dzelzitis | Thomas Leong | Susan Polgar | Tomoko Yamashiro-Petrov |
| Thomas M. Eccardt | Martin L. Levine | Mary Pulley | Yingjie Zhang |

**Sumo: 64**

*Krome, 18 personoj aŭ grupoj abonis al* Novjorka Prismo. ★


ESPERANTO-SOCIETO DE NOVJORKO
c/o UEA, 777 UN Plaza, NY, NY 10017 (212) 687-7041
http://www.geocities.com/esperanto_nyc

**Prezidanto** Thomas Eccardt (212) 477-6516
**Koresponda Sekretariino** Rochelle F. Grossman (718) 457-1490
**Protokolisto** Stuart Green (631) 751-5683
**Vicprezidanto** Thomas Leong (718) 981-4252
**Kasistino** Sofiya Soskina (718) 671-5699
**Program-Direktoro** Arturo Bonetti (718) 257-6091

**Novjorka Prismo**
Numero 110 – Januaro 2002
ISSN: 1059-5627
http://members.aol.com/novjorka/prismo

**Redaktoro** Jim Medrano (212) 982-5029
**Subredaktoroj** Thomas Eccardt, Nancee Medrano
**Desegnistino** Mary Pulley

Sendu kontribuaĵojn al:
Jim Medrano, 400 East 20th Street #1B, New York, NY 10009-8103
e-poŝto: jimmedrano@mac.com

© 2002 Esperanto Society of New York